



Kibernetiko - la aktuala
scienco. Legu detalojn

PILO-PRESS

Internacia
Informservo

en "La mondkoncepcio
de la modernaj
natursciencoj"
Prezo 9,60 DM

Redakanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 41/1974 27 nov 1974
Aperas ĉiusemajne

Internacia Silvestra Balo en Paderborn

Paderborn (hb-pp). En Paderborn, la nova ĉefurbo de Esperanto en FRG, okazos granda Silvestra Balo en la kadro de la 18a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo. Organizanto de la balo estas la novfondita Eŭropa Klubo.

Multaj Paderbornanoj, ne nur gejunuloj, kiuj nun lernas Esperanton, partoprenos ĝin. Ankaŭ profesoroj, ĉefe gekolegoj de prof. Frank, venos, kaj kompreneble ankaŭ la gazetaro.

La Estraro de la Eŭropa Klubo invitas esperantistojn ankaŭ el eksterlando partopreni tiun unikan jarfinan balon.

La oficiala nomo de la Eŭropa Klubo estas "Societo pri lingvo-limtranspaŝa Eŭropa interkompreniĝo". Ĝi fondiĝis la 15an de novembro 1974 laŭ iniciato de prof. d-ro Frank. Prezidanto fariĝis Hermann Behrmann; oficantaj vicprezidantoj estas la direktoro de la urba administracio de Paderborn, d-ro Bernward Löwenberg, kaj prof. Lothar Weeser-Krell de la Universitato Paderborn. Kvar pliaj vicprezidantoj de tiu internacia klubo estos elektitaj la 17an de decembro. Pri tiu nova societo ni raportos ankoraŭ pli detale.

Hermann Behrmann, la aŭtoro de Esperanto programita, proponas, ke foraj gastoj venu ne nur pro la Silvestra Balo, sed alvenu jam la 27-an de decembro por partopreni en unu el 8 intensaj Esperantokursoj por komencantoj kaj progresintoj en la Universitato.

Anoncojn por la kurso kaj ankaŭ mendojn pri enirbiletoj por la Silvestra Balo akceptas Hermann Behrmann, D-4972 Löhne 1.

La enirprezo por balo estas: 15 GM.

En Paderborn nuntempe lernas Esperanton 400 personoj. La 25an de novembro okazis kunveno en la Esperanto-restoracio "Tönnchen", por oficiale fondi Esperanto-societon. Okaze de "internacia popola festo" en Paderborn, la 30an de novembro, partoprenos ankaŭ esperantistoj, kiuj prezentos Esperanto-kantojn.

De la 27 - 31 decembro 1974 okazos 8 Esperanto-kursoj, du pliaj kursoj okazos de la 2 - 8 jan 1975.

Preparo al Plano por Eŭropa Edukado

Bristol. (pp) De la 8 - 10 nov 1974 okazis en la Universitato de Bristol, Britujo, konferenco de la Eŭropa Asocio de Instruistoj (EAI). Ĉeestis oficistoj el la Eduka Fako de la Eŭropa Komisiono en Bruselo, i.a. s-ro Hywell Jones, la prezidanto de EAI, André Alers, kaj la direktoro de la Informa Centro por Eŭropa Edukado, Michel P.J. Govaers.

Inter aliaj temoj estis pritraktita la lingvo-problemo en la Eŭropa Komunumo. Parolis du esperantistaj ĉeestantoj, lernejestroj Grahame Leon-Smith kaj Raif Markarian, Londono. Ili provizis por la informtablo ekzemplerojn de 1) la 1956a Raporto al la Eŭropa Konsilantaro de s-ino Rehling pri instruado de Esperanto, 2) la Esperanto-eldono de la eldonaĵo de la Informcentro de s-ro Govaers, "Eŭropa Dokumentaro", kiu aperas ankaŭ sub la aŭspicioj de EAI, 3) broŝuroj pri la Brita Asocio de Esperanto-Instruistoj kaj pri ILEI. (Daŭrigo p.2)

Eŭropa Edukado (daŭrigo)

El la 50 ĉeestantoj el kvar landoj multaj informiĝis pri Esperanto. Unu el la finaj rezolucioj estis, ke EAI kaj la Eŭropa Komisiono starigu studgrupojn por detale studi la diversajn eventualajn solvojn de la lingvoproblemo, inkluzive Esperanton.

Konferenco en Turnhout

Turnhout, Belgio (pp) Dum konferenco de la Eŭropa Asocio de Instruistoj en Turnhout, Belgio, de 2 - 4 nov 1974, oni pritraktis lern- kaj instrumalfacilaĵojn por infanoj de gastlaboristoj. Ĉe estis proksimume 50 geinstruistoj, bedaŭrinde ne ILEI-anoj, el la du lingvo-regionoj de Belgio kaj 3 el Nederlando, inter ili 1 ILEI-ano. Ĉiuj partoprenintoj ricevis i.a. tradukon de la Esperanto-teksto el Eŭropa Dokumentaro, numero 3, pri la konferenca temo. Parolis s-ro Alers, prezidanto de EAI, kaj s-ro J.F. van den Broek de la Eŭropa Komisiono, eduka fako, kiu favoras Esperanton kaj pristudas ĝin. Je la fino de la konferenco oni akceptis kelkajn rezoluciojn por prezenti al la Eŭropa Komisiono, i.a. ankaŭ rezolucion kiu enhavas la proponon esplori eblecojn por instruado de Esperanto en lernejoj de Eŭropo.

Junularaj renkontiĝoj

Emst-Epe, Nederlando (pp-voko) Denove Nederlanda Esperanto-Junularo invitis al semajnfino por komencantoj kaj progresintoj en la junulargastejo de Emst-Epe. Tre laŭdinda estis la ideo, ke la partoprenontoj povis gastigi laŭdeziro antaŭe en nederlandaj Esperantofamilioj. La organizantoj, Ineke Emmelkamp, Groningen, kaj Gerard Peet, Hilversum, povis saluti pli da gejunuloj ol antaŭe sin anoncis; inter ili estis kelkaj danoj, belgoj kaj germanoj.

La programo konsistis el prelego de Wim Baris pri la evoluo de la Eŭropaj lingvoj, el distraĵoj kaj piedpilkludado sur proksima futbalejo. Dank' al la bona organizado kaj la hejmeca atmosfero neniam ekestis enuado.

Malgraŭ finaj plendetoj de kelkaj kritikemuloj oni devas atesti al la nederlandanoj, ke tiu semajnfino prezentis jam sufiĉan kompromison inter la interesoj de komencantoj kaj progresintoj. Ĝi estas bona ekzemplo inicitinda de tiuj, kiuj planas similajn aranĝojn.

Lohne, FRG (pp-voko) La 16an de novembro la junulara Esperantogrupo Lohne okazigis amikan kunestadon, kiun partoprenis ĉ. 30 junaj esperantistoj el Cloppenburg, Osnabrück, Münster, Vechta kaj Lohne. Mangante kukon la grupoj raportis pri siaj agadoj kaj montris fotojn de IJK kaj montris fotojn pri la Internacia Junulara Konferenco en Münster kaj la renkontiĝo en Dwingeloo. Oni resumis, ke la eblecoj uzi la internacian lingvon, estas tro malmultaj por venki la staton de lingva komencanto. La Münsteranoj anoncis organizi duonjare semajnfinojn de intensa lingvo-ekzercado. Santepe oni bezonas la internacian lingvon, ĉar ĉiukaze kelkaj el la partoprenontoj estos eksterlandanoj, precipe studentoj el Münster. Tiu propono trovis viglan aplaŭdon. Jam dum la jarfina seminario en Paderborn oni atendas precizajn detalojn pri la venontaj aranĝoj en tiu regiono.

Tago de la Esperanto-Libro

La 15a de decembro estos la Tago de la Esperanto-Libro. Estis iam kutimo por ĉiu esperantisto okaze de tiu tago aĉeti almenaŭ unu Esperanto-Libron. Sekvu tiun tradicion! Mendu vian Esperanto-Libron ĉe Libroservo Ludwig Pickel, Nürnberg.

"1000 rozo-tigoj kaj la tuta mondo parolus Esperanton"

Mortis Käte Rosenstengel, Nordhorn

Nordhorn (pp) En la aĝo de 78 jaroj mortis s-ino Käte Rosenstengel, Nordhorn, la 14an de novembro 1974 en la malsanulejo.

Käte Rosenstengel estis aktiva esperantistino, vizitis multajn kongresojn kaj estis konata al multaj esperantistoj. En kvar albumoj ŝi kolektis dediĉajn vortojn kaj la subskribojn de esperantistoj el multaj landoj. Ŝiajn esperantaĵojn ŝi testamentis al la Esperanto-muzeo en Vieno. Memore al ŝi ni reproduktas parton de artikolo pri ŝi kaj ŝia E-agado el la jaro 1968 el loka gazeto:

„1000 Rosenstengel und alle Welt spräche Esperanto“

Käte Rosenstengel (72): Schicken Sie mir ein paar Schüler

HR*S* Nordhorn. „Ich möchte gerne ein Poet sein“, schrieb der Portugiese Valdimiro Belo-Farinha, „um Ihnen ein Gedicht zu widmen. Meine Gedichte genügen nicht, um mein Glück auszudrücken.“ Valdimiros Glück gründet auf Esperanto, der internationalen Sprache, und einer der Wegweiser zum Glück des Portugiesen war Frau Käte Rosenstengel, Nordhorn, Ootmarsumer Weg 79. Sie verschaffte dem Esperantisten aus Lissabon im Juni 1960 in Nordhorn eine Arbeitsstelle. Schon im gleichen Jahr zu Weihnachten gab Valdimiro seine Verlobung mit Helga bekannt, einem Mädchen aus der Lange Straße. Noch heute lebt das Paar in Nordhorn.

Mit ihren 72 Jahren ist Frau Rosenstengel nach wie vor der „Kapitän“ der Nordhorner Esperanto-Gruppe. „Eigentlich bin ich schon zu alt dafür“, sagt sie, „und ich kann auch nichts mehr weiter tun, als das Schiff vor dem Sinken zu bewahren.“

Eine junge, begeisterte Esperantistin, die sie einmal als Nachfolgerin aussersehen hatte, lebt heute in Spanien. Edith Schönwälder war ihr Mädchenname; sie schloß eine „Esperanto-Ehe“ mit einem Spanier, wozu Frau Rosenstengel mit einem lachenden und einem weinenden Auge ihren Segen gab.

„Unsere Sprache hat schon viele Ehen gestiftet“, weiß die Nordhorner Esperanto- und Musik-Lehrerin zu berichten. „Viele Ehen und zahllose Freundschaften!“

Ein außerordentlich eindrucksvolles Zeugnis sowohl für die verbindende Kraft dieser internationalen Sprache als auch für die Kontaktfreudigkeit der Esperantistin Käte Rosenstengel liefern die sieben Reisebücher und drei Gästebücher der alten Dame.

„Auf unserer Fahrt nach Holland trafen wir eine freundliche Dame, die uns mit wenigen Worten für Esperanto zu begeistern verstand. Wenn wir wieder zu Hause sind, werden wir sicher Esperanto lernen.“ Das schrieben die beiden Pfadfinder Dieter Lampe und Bernhard Wefer aus Visbek/Oldenburg.

Zwei junge Dänen, Ove Andersen und Bent E. Jensen aus Grinstedt, schrieben ins Gästebuch: „Wir kamen aus Amsterdam, als wir in Nordhorn zu einer Erfrischung eingeladen wurden. Die Dame erzählte uns einiges über Esperanto, und wir hoffen, daß noch viele andere das gleiche schöne Erlebnis haben werden.“

An einer Bushaltestelle hatte Frau Rosenstengel einen jungen Engländer



Käte Rosenstengel, „Kapitän“ der Nordhorner Esperantogruppe

der und dessen Freundin, Wilfried John Beresford und Ruth Selvester aus Rugby, aufgegeben. Die beiden warteten auf einen Bus nach Holland. „Aber die Begeisterung dieser bemerkenswerten Dame war so groß, daß wir nicht mehr nach Holland kamen“, schrieben sie später ins Gästebuch. „Ein sehr interessanter und unvergeßlicher Nachmittag für uns beide.“

Hunderte solcher Einträge finden sich in den Büchern. Touristen und Esperantisten aller Herren Länder füllten die Seiten in allen Sprachen, mit Prosa und Gedichten, mit Fotos, Zeichnungen, Visitenkarten und Briefmarken. Und in einem der Bücher steht auch der Satz einer Esperantistin: „Wenn wir tausend Rosenstengel hätten, sprächen alle Menschen Esperanto.“

Gratschaffer

GN Nachrichten

Esperanto

Liebe Freunde, im Leben geht es auf und ab. Was heute begeistert, ist morgen vielleicht schon vergessen. Das ist so mit Esperanto wie mit vielen Dingen.

Alte Zeitungen können das sehr aufschlußreich sein. Zum Beispiel schrieben die GN am 25. September 1951: „Unsere Gratschaft kann stolz auf ihre Esperantisten sein, besonders auf die jüngsten. Bald wird ein fester Zusammenschluß der Gruppen unserer Gegend erfolgen. Die Esperanto-Vereinigung Emsland soll dann ein bewährter Esperantist unserer Gratschaft führen.“


Was wurde daraus? Wie in dem Bericht auf dieser Seite zu lesen ist, sagt Frau Rosenstengel: „Ich kann auch nichts mehr weiter tun, als das Schiff vor dem Sinken zu bewahren.“

Oder: Am 28. Dezember 1954 stand in den GN: „Esperanto hilft auch am Bau der Europa-Union von unten her. Jeder Anhänger der Europa-Idee ist eigentlich auch ein Freund des Esperanto.“

Ich habe jedoch in den letzten Jahren nicht davon gehört, daß die Jungen Europäischen Föderalisten, die hier häufig von sich reden machen, Esperanto lernen oder dafür werben.

Sie sollten es tun.

Meint jedenfalls Bössel



Nach dem Esperanto-Erfinder benannt

